




ESPERO KATOLIKA

Nia Prezidanto jubileas!

Dum la Pentekosto mi vizitis nian prezidanton, sac. Alphons Beckers, en Kwaadmechelen, kaj tiam hazarde ekciis ke la 29-an de junio li memorigos la 25-an datrevenon de sia Ordino. Je mia iom riproĉa demando, kial li ne pli frue sciigis tion al mi, por ke mi diskonigu tion en la junia numero de E.K., li lakone respondis: „Vi ja povos mencii tion en la julia numero; cetere mi celebris mian unuan sanktan Meson nur je la unua de julio!” Montriĝis ke ĝis tiam eĉ liaj paroĥanoj ne sciis ion! Jen bona skizo de lia karaktero: li ne ŝatas la fanfarojn kaj preferas senbrue fari sian laboron, kiel li faris ĝin simple kaj memkompreneble, sed bonege dum ĉiuj tiuj jaroj.

Mankas eĉ precizaj datoj, sed mi proksimume, laŭmemore, povas skizi la sacerdotan vivovoĵon de nia prezidanto: dum ĉ. 12 jaroj li estis profesoro ĉe la normallernejo — porinstruista seminario — en Mechelen aan de Maas; poste dum ĉ. 9 jaroj vikario en Overpelt-Fabriek; komence de 1956 li fariĝis paroĥestro en la ĉarma, granda vilaĝo Kwaadmechelen, kie nelonge antaŭe la dum la milito detruita preĝejo estis restarigita. La foto montras nian Jubileanton antaŭ la ĉefaltaro de tiu bela, hela, moderna preĝejo.



Sacerdoto en eterno.

Mi dankas Dion okaze de mia
25-jara sacerdota jubileo.

29an de junio 1935 —
29an de junio 1960.

Kore mi salutas la gesamideanojn
el ĉiuj landoj de la mondo. Mi
petas ilin kune preĝi por ke ĉiuj
esti unu, por ke fariĝu unueco
inter ĉiuj kristanoj, paco kaj in-
terkompreno inter la popoloj.

*BECKERS ALFONS, paroĥestro
KWAADMECHELEN, Belgujo*

Pri la laboro de Sac. Beckers kiel prezidanto de IKUE nun ne temas; pri lia sacerdota agado mi nenion scius, se paroĥanoj ne estus informintaj min: Post alveno en Overpelt-Fabriek kiel vikario, sac. Beckers trovis tie preskaŭ senvivan paroĥon: la maljuna, malsaneta paroĥestro sola ne povis multe fari. Sed baldaŭ restariĝis ĉiuspecaj unuiĝoj: religiaj, laboristaj, sportaj, ktp. kaj li aktivigis arojn da gejunuloj, viroj kaj virinoj en diversaj taskoj, tiel ke reto de religiaj kaj bonfaraj kernoj zorgis pri vigla paroĥa vivo. Neniun posttagmezon la vikario estis hejme, ĉar tiam li vizitis la familiojn kaj kun la helpo de Dio li sukcesis, rekonduki al la ŝaĝejo de Kristo multajn perditajn ŝaĝojn, kiuj ne pro malico, sed pro manko de gvidado, perdis la vojon. Ankaŭ neniam oni vespere povis trovi la vikarion hejme: tiam ja okazis la diversspecaj kunvenoj. Dum la manĝoj abunde venis vizitantaj paroĥanoj, tiel ke li ĝis ses aŭ okfoje devis interrompi la manĝon; kiam mi iam faris rimarkon pri la neĝentileco de homoj, kiuj ĉiam venas dum la manĝotempo, li ridetante respondis: „Sed ili ja scias ke mi nur dum tiu ĉi tempo estas hejme!”

En la nuna paroĥo la aferoj marŝas proksimume en la sama maniero. Kiam je Pentekosto pli ol 50 infanoj faris sian solenan s. Komunion kun granda brilo, unu el la paroĥanoj diris al mi: „Ho, nia paroĥestro estas bonega: li ĉiam scias fari la aferojn tiel bele kaj bone!”

Certe mi parolas en la nomo de ĉiuj IKUE-membroj kiam mi deziras al nia prezidanto ankoraŭ multajn, gracoplenajn jarojn, kun abunda beno de Dio super lia sacerdota laboro! Plej korajn gratulojn al nia Jubileanto kaj lia paren caro!

Truus Durenkamp.

PAX CHRISTI.

Unuaj en laboro por la paco	Nin, Kristo-anojn, ankaŭ Lia paco
Ja devas esti ni gekatolikoj;	Kunigi kaj instigi ĉiam devas;
En sfero de malhelo kaj minaco	Al respondeco vokas Lia graco,
Jen pac-agantoj, veraj pac-amikoj!	Se mond' cetera amuzeme revas!

Neniam iu sento de malamo
 Estiĝu, regu en kristana koro,
 Sed de la am-spirito sankta flamo
 Nin gvidu al porpaca ag-fervoro!

Walter Mudrak, Vieno.

20. *Atentu Mastriĥto!*

Laŭ *Volkskrant* 22.3.60: oni aranĝos je 15 kaj 16.7.60, okaze de la ora jubileo de la Limburga Katolika Gimnastik-Ligo, la eŭropajn gimnastikajn ĉampionecojn de la Internacia Katolika Federacio por Korpa Edukada. Partoprenos grupoj el Hispanujo, Aŭstrujo, Francujo, Germanujo, Nederlando kaj verŝajne Italujo, do minimume de ses lingvoj. Vi esploru kiel sonos la diversaj teknikaj terminoj! Eble ĉio estos anoncata..... en angla lingvo!

Karaj legantoj..... ktp. ktp.! Se vi trovos materialon por nia muelilo, nepre sendu ĝin al

Sac. C. A. Ouwendijk, Rijpwetering, Nederlando.



15. *Liter-kombinaĵoj.*

En *Tijd-Maasbode* (Ned.) 10.5.60 aŭtoro, preparolante porlernejan vojaĝantan ekspozicion pri interlandaj (eŭropaj) aferoj, sopiras: „Kiu el ni konas savon el la komplikaj eŭropaj literkombinaĵoj, kiujn gazeto, radio kaj televido ĉiutage prezentas al ni?... Ni supozas ke nur malmultaj instruistoj kuraĝos pri tio ekzamenigi sin de siaj lernantoj...”

16. *Eŭropa Universitato.*

Volkskrant (Ned.) 14.5.60: Profesoro de la universitato en Nimego, L. Schlichting, preparolas la malfacilaĵojn kontraŭ la „kompleta universitato” (germane: *Voll-Universität*), faritajn de la, ankaŭ eŭropaj, universitatoj. Tiaj oni povas rigardi la ne tiel forma-

lajn, sed gravajn malfacilaĵojn de la instruo divers-lingva. „Kiu foje kaj ree havas la okazon aŭdi lecionojn en fremda, nome ankaŭ en lingvo kiu por la docento mem estas fremda, ne tro malalte taksos tiujn malfacilaĵojn.”

Pri la sama temo alia profesoro, d-ro Brugmans, en *Tijd-Maasbode* 3.3.60 esprimas sian zorgon. I.a. li diris: „La rekrutigo de profesoroj por universitata studo kunportas grandegajn malfacilaĵojn. Granda klerulo povas esti malbona eŭropa instruisto, eventuale pro sia lingva malforteco.....”

17. *Kuracistoj eksigataj pro nesufiĉa lingvo-scio.*


Tio kion ni supre menciis, montriĝas el jena novaĵo en *Volkskrant* 8.6.60: Ĉirkaŭ 4000 kuracistoj, kiuj akiris sian kapablecon en eksterlandaj universitatoj, estos je 1.7.60 eksigataj el usonaj malsanulejoj, ĉar „ilia medicina eduko kaj kono de la angla lingvo estas tiel neperfektaj, ke ili estas danĝero por la pacientoj en la hospitaloj.”

18. *Kompatinda angla lingvo!*

En *Streven* „Alcelado”, monata revuo por spirita vivo kaj kulturo, junio 1960, primoketante la modon de „Renkontoj”, K. Elno rakontas pri grandskala kunsido por industria planado, aranĝita en Hago, Ned. Ĉeestis kvin interesaj parolantoj: du nederlandanoj, aŭstro, italo kaj anglo; mondfama arkitekto kiel prezidanto kaj sufiĉe selektita publiko. La plej elstara fakto de tiu renkonto estis la elekto de la uzata lingvo: ĉio, la invito, la multobligitaj tekstoj, la paroladoj, la ronddemando, preskaŭ ekskluzive angle. Tio liveris sufiĉe da ridspico. La elmontrita lingvoscio estis kaŭzo de tre strangaj proponoj, ĉar oni ofte uzis vere nekompreneblajn kaj ridindajn vortojn por esprimi sin, tiel ke la londona parolanto komencis sian prelegon esprimante la esperon, ke la ĉeestantoj povos kompreni lin „after all the English you were listening to before” (post ĉio anglalingva kion vi ĝis nun aŭdis), sed la diskutantaj nederlandanoj evidente pli ŝatis enretiĝi en la laokona-angla nodo ol uzi la lingvon, kiun ili iam balbutante lernis de sia panjo.

19. *Interpretista potenco.*

Leidse krant 19.5.60: Post la malsukceso de la „topkonferenco” Krutĉov faris preskonferencon, kiun li post du horoj kaj dudek minutoj finis, klarigante, ke li estas inklina daŭrigi la paroladon, tamen la interpretistoj diris ke ilia labortago finiĝas. „Kaj mi devas respekti ilian laborkontrakton, alie ili diros: vi nepre devas fini vian konferencon, aŭ ni faros tion por vi”.



Kvara Mondkunveno
de katolikaj esperantistoj en la kadro de la
XXXVIIa EŬKARISTIA
MONDKONGRESO en **MUNKENO**
de la 31a de julio ĝis la 7a de aŭgusto 1960.

Dektria Bulteno de la L.K.K.

Siatempe ni publikigis, ke dum majo ni forsendos la partoprenkarton kaj la ĉambrokvitancan. Bedaurinde ĝis junio ni ne jam ricevis de la Komitato tiujn-ĉi dokumentojn, pro la fakto ke la Komitato plilongigis la terminon por la aliĝoj. Verŝajne ili ekkonis, ke la dato, kiun ili siatempe fiksis, la 15.4., estis multe tro frua kaj pro tio ankoraŭ ne aliĝis tiom kiom ili atendis. Ni esperas, ke ĝis la alveno de la julia numero de E.K. ankaŭ la dokumentoj atingis nin kaj estas jam survoje al vi. La kritiko, kiun diversaj kongresanoj direktis al ni, estas senbaza.

Ni ripetas ĉe tiu ĉi okazo, ke neniam kongreso estis preparita sub tiaj malfacilaj cirkonstancoj. En ĉiuj aferoj estas ligitaj al ni la manoj kaj ni devas en ĉio niavice demandi ĉe la Komitato de la Eŭko.

Ni jam demandis ankaŭ pri ĉambro aŭ ejo en la stacidomo, por instali akceptejon. Sed la Komitato de la Eŭko mem ne jam scias, kiajn ejojn ili ricevos de la Fervojo, ĉar nia stacidomo ĵus estas en novkonstruo. Oni esperas, fini la novkonstruon ĝis la EŭKo sed kun certeco oni ne povas diri ion. Pro tio ni decidis ke ni faru la akceptejon en nia kongresejo, la paroĥa salonego (*Pfarrheim*) en *Gräfelfing*, kie ni disdonos la ceterajn kongresajn paperojn. Sed por helpi al niaj alvenontaj kongresanoj, ni decidis, fari daŭran deĵoron sabate, 30.7. en nia stacidomo. Alveninte, vi iru tuj al la elirejo de la *relo no. 18*. Tie vi certe trovos gesamideanojn kun flageto aŭ rubando kun Esperanto-stelo. Tiuj ĉi gvidos vin al la *Starnbergerbahnhof*, de kie veturos la trajnoj al *Gräfelfing*. En la stacidomo de *Gräfelfing* denove atendos vin gvidantoj. Se en iu momento hazarde neniŭ ĉeestus, demandu ĉe la *Pfarrhaus* (paroĥa domo), malproksime nur 5 minutojn de la stacidomo. Nia kongresejo estas apud la paroĥa domo, do facile trovebla, *Bahnhofstrato 12*.

Aliĝis ĝis 5, 6, 60: 187 personoj el 13 landoj, 13 Aŭstrujo, 1 Anglujo, 4 Belgujo, 2 Brazilo, 13 Francujo, 102 Germanujo, 13 Hispanujo, 1 Irlando, 5 Italujo, 1 Jugoslavio, 25 Nederlando, 6 Polujo, 1 Svisujo; inter ili 21 sacerdotoj.

P R O G R A M O

Sabate 30.7. 20a h. *Interkona vespero*; priparolo de la estontaj okazajoj, ekskursoj ktp.

Dimanĉe 31.7. 8a h. *Sankta Meso* laŭ „Ni oferas”; celebros kaj predikos la IKUE-prezidanto, *sac. Alphons Beckers, Belgujo*.

Beno de la nova IKUE-flago.

10a h. *Kunveno de la sacerdotoj*, kiuj i.a. priparolos la unuecan tekston de la ĉefa preĝoj kaj la katolikan terminaron.

Posttagmeze *veturo al Munkeno* por viziti muzeojn, vidindaĵojn ktp.

Lunde 1.8. 8a h. Sankta Meso; celebros kaj predikos *Patro Giacinto Jacobitti O.P., Italujo.*

10a h. *Malfermo de la Kongreso.* Salutparoloj de diversnaciaj reprezentantoj. Posttagmeze komuna pilgrimado al *Maria Eich*, piede 3 km.
20a h. *Estrarkunveno.*

Marde 2.8. 8a h. Sankta Meso; celebros kaj predikos *Dekano Jakobo Bergweiler, Germanujo.*

10a h. *Ĝenerala Kunveno de IKUE;* parolado de sac. A. Beckers, prezidanto. Laŭtleĝo de la envenintaj leteroj kaj proponoj. Raporto de la ĝen. sekr. pri farita kaj farota laboro.

Referato de *Patro H. G. Wannemakers S.J., Nederlando* pri „La propra karaktero de nia katolika Esperanto-movado kaj ties ekzistorajto.

Diskonigo de dato, lando kaj loko de la venonta IKUE-kongreso.
Diskutado.

Posttagmeze eble vizito de la tombo de prof. Mielert kaj depono de florkrono: aŭtobuse aŭ piede tra arbaro — 5 km.

Merkrede 3.8. 8a h. Sankta Meso; celebros kaj predikos *Religia Inspektoro Ludwig Thalmer, Germanujo.*

10a h. Lasta oficiala kunsido de la *4-a Esperantista Eŭkaristia Mondkunveno.* Raportoj pri la preparoj koncerne la unucan tekston de la ĉefaj preĝoj kaj pri la katolika terminaro, fare de *Patro H. G. Wannemakers S.J., Nederlando.*

La sekvontajn tagojn ni vizitos la aranĝojn de la Eŭkaristia Kongreso en Munkeno, ekspoziciojn ktp. Ni povos ankaŭ fari diversajn ekskursojn inter la programeroj: ekzistas multaj belegaj vidindaĵoj en la ĉirkaŭaĵoj de Munkeno kaj Gräfelfing. Tial ni ne superŝarĝis la programon, por ke la kongresanoj mem decidu, en grupoj aŭ grupetoj aŭ memstare fari ekskursojn.

La programaj kunvenoj okazos en nia propra kunvenejo, la Diservoj en la al ni disponigita preĝejo, ĉio en *Gräfelfing.* Estas eble, ke ankaŭ dum la ceteraj tagoj okazos s. Mesoj kun predikoj, se anonciĝintaj sacerdotoj el Orienteŭropo efektive alvenos. Ŝanĝoj en la programo, precipe en rilato al la aranĝoj de la Eŭkaristia Kongreso, estas eblaj.



El: *La Nica Literatura Revuo.*

N. Z. Maimon: La cionista periodo en la vivo de Zamenhof en: 1958, vol. 3, 126-137; 165-177

G. Waringhien: Pri la „Angla Antologio” en: 1958, vol. 4, 32-40

Reto Rossetti: Recenzo pri „Kien la poezio” de B. Clark en: 1958, vol. 4, 46-49

L. Zamenhof: Leteroj kaj fragmentoj en: 1959, vol. 4, 82-83, 121-122; 161-163; 201-208; vol. 5, 1-4; 41-44
Naĥum Sokolov: La cenzuristo Marko Zamenhof, trad. N.Z. Maimon; en: 1959, vol. 4, 83-89.

NIA PRESEJO FORBRULIS!

En la fino de aprilo, tuj post kiam nia maja numero estis ekspedita al *Dordrecht*, okazis dumnokta incendio en panbakejo situanta najbare al nia presejo en *Tilburg*. La flamoj atingis la tegmenton de la presejo, kie troviĝis grandega amaso da paperaĵoj, i.a. dekmiloj da novaj kovriloj por nia revuo. Ĉio forbrulis, ankaŭ la planko de tiu etaĝo, kiu frakasiĝis, detruante la presmaŝinojn ktp. starantaj mal-supre. La fajrestingistoj ĵus antaŭe povis elporti la tute novan kompostmaŝinon kun la Esperanto-literoj, kiu estis transportata al la loĝejo de la presisto. Tie sinjoroj Smits, patro kaj filo, nun kunmetas la tekston de *Espero Katolika*, *Birdo*, kaj aliaj presajoj, sed poste ili devas sendi la kompostajon al alia presejo, ĝis ilia estos rekonstruita. Pruvo de la granda sindonemo kaj nerompiĝebla kuraĝo de tiuj sinjoroj estas, ke malgraŭ la katastrofo la maja n-ro de *Birdo* kaj la junia de *Espero Katolika* aperis ĝustatempe, kiel ĉiam, tiel ke neniu el niaj legantoj eĉ rimarkis, ke okazis io eksterordinara! Pro tio ni esprimas nian varman dankon al la laŭdindaj sinjoroj kaj samtempe la deziron, ke la nova konstruaĵo estos preta ankoraŭ en ĉi tiu jaro.

Bedaŭrinde la presisto mem, s-ro *Piet Smits* kaptis malvarmumon dum tiu katastrofa nokto; li daŭrigis la laboron, sed post kelkaj semajnoj devis enlitiĝi pro pulminflamo; la krizo intertempe forpasis, sed li devos ripozi dum ankoraŭ sufiĉe longa tempo. Niaj legantoj certe volos preĝi *Patro Nia'n* por la resaniĝo de nia bona presisto kaj senkulpigi, se eble pro tiuj kialoj ĉi tiu numero de nia revuo alvenus iom malfrue.

ESPERANTO VIVAS



AŬSTRUJO, Vieno. En la kadro de la ĝenerala kunveno de la Aŭstria Esperanto-Konferenco kaj jubileo de la 15-jara ekzisto post refondiĝo en 1945, la ĉiam fervora IKUE-sekcio AKLE aranĝis fakkunvenon; okazis sankta Meso kun preĝoj kaj kantoj en Esperanto, kaj predikis en nia lingvo *Patro Pius Lenz OFM.Cap.* Dum la solena kunveno festparolis d-ro *A. Halbedl*; lumbildparoladojn pri la Esperanto-movado en Aŭstrujo faris la prezidanto de AEF, s-ro *R. Cech*. La festa grupkunveno de 14.6.60 havis la temon: *50 jarojn IKUE*. Gazetraportoj aperis en *Die Furche*, *Das Kleine Volksblatt*, k.a.

POLLANDO. Nova strato en *Wloclawek* ricevis la nomon de *L. L. Zamenhof*. En tiu afero multe meritas nia samideano kaj urba konsilisto *Mieczislaw Wojciechowski*, kaj la vcdirektoro de loka filio de la Nacia Pola Banko, *Leon Kordyla*, simpatianto de nia movado. *

ITALUJO. La IKUE-sekcio UECI starigis du novajn grupojn, nome unu en la urbo *Massa* kaj unu en *Mondovi*, kaj esperas ke multaj aliaj urboj sekvos. — *Sac. Angelo Durante* komencis kurson por la mezlernejoj „Guido Novello”; partoprenas 31 gejunuloj. — En *Trapani* estis organizata E-kurso en la „Pio Istituto dell' Incononata”. En la sama urbo okazis la inaŭguro de *Esperanto-lernejo* ĉe la Kolegio-Instituto *Sacro Cuore*. La Episkopo de *Trapani*, *Mstro. Corrado Mingo* ricevis la delegiton de UECI kaj deklaris sin favora al la disvastigo de Esperanto inter la katolikoj. — En *Verona* okazis granda manifestacio en la centjarfesto de D-ro *Zamenhof*, 27.3.60. Por la katolika movado parolis s-ro *prof. Ruaro*, prezidanto de la UECI-sekcio. Esperanto kursoj komenciĝis en la paroĥo de *Porta Nuova* kaj en la *Instituto Don Mazza*. La S. Rozarion oni preĝis en Esperanto ĉiujn dimanĉojn de la monato majo en la klubejo.

HISPANUJO. La urbo *Moyá*, en la provinco *Barcelona*, estas jam fama Esperanto-citadelo, precipe pro la senlaca laboro de nia membro s-ro *Ramón Molera*, ĉefdelegito de UEA. Li esperantiĝis kiel 14-jara knabo kaj poste senlace laboris por nia movado, rekrutante ne nur multajn novajn adeptojn, sed ankaŭ valorajn kunhelpantojn. En *Moyá* jam 100 personoj finis Esperanto-kurson, kaj nutempe okazas tie kursoj kun preskaŭ 300 partoprenantoj. Ankaŭ en sia privata vivo s-ro Molera konsekvence uzas nian lingvon: ĵus ni ricevis belan memorbildeton en Esperanto pro la Unua S. Komunio de lia fileto *Jaume* (Jakobo). Koran gratulon al la familio kaj grandan sukceson por la kursoj! —

La *Madrida Esperanto-klubo* ankaŭ estas tre aktiva. Okazis prelegoj en diversaj rondoj, koncerto de la hungara violonistino s-ino *Illona*; ankaŭ prelego de la japana s-ano *Einzo Itoo* kun koloraj diapozitivoj kaj traduko hispanen fare de s-ro *Figueroa* por la multaj ĉeestantaj ne-esperantistoj. La *Eduka Ministerio* interesiĝis pri Esperanto kaj petis informojn pri nia movado. — En la urbo *Olot* (*Gerona*), kie oni ĝis nun ne sciis pri ekzisto de esperantistoj, s-ro *Antonio Rodeja*, direktoro de „Grupo Escolar” (lerneja grupo) komencis E — kurson, al kiu entuziasme partoprenas pli ol 30 infanoj. — En multaj aliaj urboj okazas kursoj, kunvenoj, festenoj, unuvorte: regas vigla Esperanto-vivo. *

UNESKO - NOVAĴOJ

STATISTIKO PRI LA GAZETARO

Oni eldonas sur la tero ĉirkaŭ 30.000 gazetojn, el kiuj 8.000 aperas ĉiutage kaj 22.000 malpli ofte. El la ĵurnaloj proksimume du trionoj aperas matene kaj unu triono vespere. La tuta nombro da disvenditaj ĵurnaloj estas taksita je pli ol 250 milionoj, t.e. po ĉirkaŭ 92 ekzempleroj por ĉiu milo da teranoj. Oni taksis, ke la tuta nombro da neĵurnalaj gazetoj venditaj estas ĉirkaŭ 200 milionoj, t.e. po 72 ekzempleroj por ĉiu milo da homoj.

Tiujn ciferojn enhavas referato kun la titolo „Statistiko pri la Gazetaro” eldonita de Unesko kiel rezulto de ĝiaj esploroj en 146 landoj. La raporto konsistas el kvar partoj: gazetoj de ĝenerala intereso, ĵurnalaj kaj neĵurnalaj; fakaj gazetoj; proponoj por klasifiki kaj difini ĵurnalojn kaj aliajn gazetojn; kaj serio de statistikaj tabeloj, kiuj montras la detalojn de la esplorkonstatoj.

Laŭ la statistiko, proksimume triono de ĉiuj gazetoj estas eldonita en Norda Ameriko, triono en Eŭropo inkluzive Sovet-Union, kaj triono en la cetera mondo. Verŝajne preskaŭ duono de la tuta ĵurnalaro estas eldonata en Eŭropo (inkluzive Sovet-Union), kvarono en Norda Ameriko, kaj iomete pli ol kvarono sur la cetera tero. La proporcioj de disvendo de neĵurnalaj gazetoj estas po 45% en Norda Ameriko kaj Eŭropo (inkluzive Sovet-Union) kaj 10% en la cetera mondo.

El la diskuto pri la afero en la kunsido de la Plenuma Komitato de UNESKO de la 25-a de novembro 1959 sekvas, ke pluraj membroj apogis la proponon de Brazilo, Japanujo kaj UEA rilate D-ron Zamenhof, dum neniu membro esprimis kontraŭan opinion.

RADIO-GANO VOKAS. Oni komencis konstrui kvar novajn radiosendilojn en Gano. Ili dissendos programojn al fremdaj landoj per kvin lingvoj: angla, araba, franca, germana kaj suahila.

Laŭ Unesco-Features kaj UEA-Informservo.



HISPANUJO. En la katedralo de *Madrid* okazis de 27.5 ĝis Pentekosto tagnaŭo kun predikoj de *Patro Rikardo Lombardi*, ĝenerala direktoro de la *Movado por pli bona Mondo* (M.M.). La temo de la konferencoj estis: *La unueco de la karito inter la katolikoj*". Pro la graveco de la ideo kaj la famo de la predikisto, la nacia hispana radio d'ssendis la predikojn per ĉiuj stacioj. Sinsekve estis pritraktata la amo en diversaj rilatoj: inter geedzoj, inter la diversaj sociaj klasoj, inter la diverspecaj politikaj grupoj de unu nacio, inter la nacioj mem, inter superuloj kaj sub-

uloj kaj inter la diversspecaj katolikaj unuiĝoj. La tagon antaŭ Pentekosto oni destinis al instigo al restarigo de la unueco kie la harmonio estus rompita. La eksperimento vekis grandan intereson en la tuta lando, kaj oni esperas ke ĝi baldaŭ estos aplikata en la tuta Eklezio. *

USONO. Unu el la plej modernaj kaj bone provizitaj katolikaj bibliotekoj en la mondo estas sendube la „*Pius XII Memorial Library*”, antaŭ nelonge inaŭgurita en ĉeesto de *Kardinalo Cushing*, ĉefepiskopo de *Boston*, kaj aliaj eminentuloj. La biblioteko, kiu apartenas al la universitato de *Saint Louis*, posedas 600.000 librojn, kiuj estas aranĝitaj en konstruaĵo de $74 \times 43 \times 19$ metroj, kie samtempe 1500 personoj povas konsulti deziratajn librojn. Ĝi disponas pri granda kolekto de mikrofotografitaj manuskriptoj de la *Vatikana Biblioteko*: sur fotogramoj de 35 mm. estas reproduktitaj 11.000.000 paĝoj, grandega trezoro je dispono de studentoj de la historio. La iniciaton al tiu kolosa verko prenis *P. Reinert*, rektoro de la Universitato, kiu timis ke pro la nuna malkonstanta situo de la mondo ekzistas la danĝero al katastrofo kiu detruus la multvalorajn bibliotekojn, kaj tial estimis prudente, konservi la trezorojn de la *Vatikana Biblioteko*, fotokopiante ilin. La grandega laboro komenciĝis 25.2.1952 kaj daŭris 4 jarojn. De ĉiuj fotografitaj paĝoj ankaŭ troviĝas la negativo en la universitato de *S. Louis*; en *Romo* estas konservata dua kolekto de pozitivaj, por la uzo de studentoj en la tuta mondo, por ke la tiel subtilaj originalaj verkoj daŭre restu en la *Vatikano*. — Por niaj legantoj certe estas interesa la scio, ke la universitata biblioteko de *S. Louis* ek de sia inaŭguro estas abonanto de *ESPERO KATOLIKA* *

FRANCUJO. Karavano de ciganaj veturiloj pro la vintro ne povis daŭrigi sian vojon kaj devis resti en la ĉirkaŭaĵo de *Parizo*. Du sacerdotoj kaj instruisto iris tien por paroli kun la ciganoj, kies fidon ili gajnis per sia afabla intereso. Tiamaniere la sacerdotoj povis paroli pri la religio kaj baldaŭ unu el la veturiloj estis riparita kaj alikonstruita por servi kiel lernejo, kie la instruisto enkondukas la infanojn en la lerneajn fakojn, kaj la Patroj instruas la kateĥismon. Dimanĉe la veturilo estas uzata kiel kapelo, kie la infanoj, ofte akompanataj de siaj gepatroj, ĉeestas la *S. Meson*. *

TURKUJO. La Patriarko *Athenagora I*, spirita ĉefo de 130 milionoj da ortodoksaj kristanoj, daŭre alvokas al unueco inter la kristanaro. En aprilo ĉ.j. li denove instigis al tio, dirante i.a. ke la divideco en la Eklezio de Kristo estas kontraŭ la volo de Kristo kaj grave malhelpas la efektivigon de la celo, por kiu Li sakrificis sin.

Agentejo „Mondo Migliore”, Romo.

URĜA ALVOKO

Ĉijare okazos i.a. jenaj kunvenoj internaciaj:

- 10-17/7 en *Vieno, Aŭstrujo*: Int. Katolika Filmofico (angle: Int. Catholic Film Office).
24-29/7 en *Romo*: Int. konferenco de katolikaj institucioj karitataj (angle: Int. Conference of Catholic Charities).
25-31/7 en *Munkeno, Germanujo*: Int. Federacio de Katolikaj Fizikistoj (angle: Int. Federation of Roman Catholic Physicians).
26-30/7 en *Munkeno, Germanujo*: Int. Katolikaj Organizoj (angle: Int. Catholic Organizations).
27-31/7 en *Munkeno, Germanujo*: „Pax Romana”, Int. Sekretariejo de Katolikaj Artistoj (angle: Int. Secretariat of Catholic Artists).
31/7-7/8 en *Munkeno, Germanujo*: Int. Eŭkaristia Kongreso.
4/8 — en *Munkeno, Germanujo*: Pax Christi.
4/8 — en *Munkeno, Germanujo*: Tria Ordeno de S. Dominiko.
9-12/8 en *Bruĝo, Belgujo*: Mondunuiĝo de katolikaj Instruistoj (angle: World Union of Catholic Teachers);
10-22/8 en *Lisbono, Portugalujo*: Pax Romana: Internacia movado de katolikaj studentoj (angle: Int. Movement of Catholic Students);
12-22/8 en *Romo, Italujo*: Unesco — Internacia Junularfederacio katolika (angle: Int. Catholic Youth Federation);
15-20/8 en *Rio de Janeiro, Brazilo*: Internacia Katolika Asocio pri Radio kaj Televido (angle: Int. Catholic Association for Radio and Television);
15-21/8 en *Elizabeturbo (Kongo)*: Mondfederacio de katolikaj junaj virinoj kaj junulinoj (angle: World Federation of Catholic Young Women and Gils);
21-25/8 en *Ottawa, Kanado*: Internacia Komisiono katolika pri migrado (angle: Int. Catholic Migration Commission).
21-27/8 en *Rio de Janeiro, Brazilo*: Federacio de katolikaj Universitatoj (angle: Federation of Catholic Universities).
22-26/8 en *Bogota, Kolombio*: Internacia katolika Asocio pri Radio kaj Televido.
27-31/8 en *Tioumliline, Maroko*: Pax Romana (ICMICA).

Kiuj samideanoj, prefere partoprenontaj en la kunvenoj, volas propagandi tie la uzadon de la lingvo Esperanto, per diverslingvaj flugfolioj kiujn ni tiucele presigis? Bonvolu skribi al:

S-ro Rik de Roover, Luchtvaartstraat 28, Borgerhout, (Antverpeno, Belgujo).

JUBILEO-DONACOJ, RICEVITAJ ĜIS 15.6.60 :

Antaŭa sumo: f 53,80; Francujo: s-ro R.O. en N. f 5,—; Germanujo: s-ro W.H. en E. f 3,90; Aŭstrujo: s-ro W.M. en W. f 7,25; Nederlando: s-r L. de J. en V. f 10,—; entute: 79,95 ned.guld. Koran dankon al la donacintoj! Ceteraj donacoj en nia jubilea jaro estos danke akceptataj: la mono servos por nia propra revuo !

KIEL KUTIME ESPERO KATOLIKA NE APEROS EN AUGŬSTO. NIA CENTRA OFICEJO ESTOS FERMITA PRO LIBERTEMPO DE PROKSIMUME 25.7 - 20.8.60.

LA INFANO DE LA SAHARO.

La brunkolora infano surgenu sidis sur la flava brila sablo en kiun ĝi per siaj fingretoj desegnis kapricajn liniojn, kiuj kune formis strangan, fantazian motivon. Malantaŭ la infano verdaj palmoj salutgestis ĉielen. Kaj antaŭ kaj ĉirkaŭ la infano etendiĝis la tuto de la sahara sablo pli malproksimen ol homa okulo kapablas vidi, ĝis la misteraj preskaŭ senfinaj horizontoj, kien nur pensoj kaj deziroj povas penetri. La infano leviĝis kaj rigardis al la alto de la blua ĉielo, de kie la suno senkompate brulradiis. Poste ĝi rigardis siajn fingrojn, sur kiuj glutiĝis briletantaj sableroj kiel miriadoj da brilantoj, kaj denove sin klinis antaŭen por skribi en la sablon: strangajn, sensignifajn liniojn.

Regis tomba silento kaj vole nevole mi pensis: ĉi tiu infano posedas la plej grandan sablujon en la mondo, kiel ekz. nederlanda infano posedas la plej grandan amason da akvo. Sed ĉe la kulmino de iliaj deziroj la revoj de ambaŭ sin renkontas; la nederlanda infano ludanta en la akvodefluiloj de la strato per alumetuloj kaj korkoj, ne povas imagi ion pli belan ol sablo kaj pli da sablo, per kiu ĝi povas konstrui fortikaĵojn kaj kastelojn. Per malgranda peco de la Saharo ĝi povus esti granda kastelestro! Kaj la nedifinitaj deziroj de la sahara ido eble manifestiĝas per primitiva imago de fregatoj kiuj naĝas sur la maroj, se ĝi nur per unu el niaj stratdefluiloj jam povus esti ŝipestro.

Enŝarĝite mi rigardis la infanon ĉe ĝia esence tiel mortenhava ludo. Ĉar same kiel nia nederlanda infano kelkfoje subite spertas la minacon de la akvo, tiel ankaŭ por la infano de la Saharo la sablo estas samtempe amiko kaj malamiko. Ĝi ĉirkaŭas ĝin, izolas ĝin kaj sufokas ĝin, ŝtelvenante sed certe, kiel la verdaj oazoj daŭre estas de la sablo atakataj kaj kelkfoje tute superŝutataj.

Tamen kiel en la batalo kontraŭ la akvo, mara aŭ rivera, tiel ĉi tie ni trovas homojn, kiuj akceptas la provokon de la torento kaj — silentaj — rezistas ĝin. Kaj ĉi tie do okazas la formado de nia „ido de la Saharo“. Tia oaza vilaĝo estas stranga komunumo, en kiu la infano akiris vere propran lokon pace aŭ batale. Kiel malgrandaj sendependuloj ili trakuras la stratojn de la argila vilaĝo. Ili eniras ĉe la patrino de Omar kaj Jusuf, ĉe la gepatroj de Haslen kaj Slimane kaj ĉie, kie plaĉas al ili. Ĉar ili estas bonvenaj kiel la malmulto da akvo, kiu de tempo al tempo falas el la ĉielo kaj ŝpruĉas malsupren. Multaj infanoj naskiĝas ĉi tie. Bedaŭrinde, nur la plej fortaj restos vivantaj. Ĉar en la sango kaj en la lando sin kaŝas la malsanoj, kiel oni povas legi en la oficialaj eldonoj de la alĝeria registaro. „La Saharo estas lando de neverŝajna, ega malriĉo, super ĉio la patrujo de paŭperismo. Estas necese liberigi la popolon el ĝia mizero kaj de la skurĝoj, kiuj regule maldensigas ĝian nombron“.

Mi vidis centojn da kripligitoj kaj mizeruloj trafitaj de malsanoj, kaj la konsternige grandajn kvantojn da viktimoj de terura, infekta okulmalsano, kiu senkompate vagadas tra la oazoj.. Multaj infanoj denaske suferas pro tiu malsano. Apenaŭ ili povas vidi la lumon.

Sed francaj kuracistoj komencis la batalon kontraŭ ĉiuj mizeroj kiuj, kune kun la skorpioj kaj venenaj serpentoj, minacas en ĉi tiu amaso da danĝerplena sablo. Per vakcinadoj kaj vakcinoj oni haltigis jam la variolon. Kaj ankaŭ la timiga tifo estas puŝita for de la tereno, kie senrivale regis la morto. En specialaj klinikoj oni flegas la suferantojn pro la okumalsano. Dum ĉi tiu batalo por la lumo, la patrino kaj ŝia infano estas akurate observataj kaj samtempe oni preskribas specialan, sanigan, kaj fortigan nutraĵon. La bebo estas observata de la medicinistoj ek de ĝia naskiĝo ĝis la dekoka monato, kaj post tio ĝiaj vivoŝancoj estas multe pli grandaj!

En la oazo Taghit loĝis juna kuracisto inter la dikaj muroj de la „bordj” (militista fortikaĵo), al kiu oni konfidis la medicinan zorgon por la loĝantoj de sep vilaĝoj. Nur ok monatojn li estis pasiginta en Taghit kaj li jam aspektis ege laca. Li diris: „Oni malesperiĝas rigardante la mizeron, en kiu vivas tiuj homoj; oni malesperiĝas komprenante kiel la infanoj grandiĝas tie; oni malesperiĝas, ĉar oni estas senpova. Sed ili mem ne konas la malesperon. Ili havas „mektub”, la fatalismon, kaj tio eĉ pli senesperigas onin”.

La infanoj eĉ malhavas la necesan instruadon, ĉar ankoraŭ nun mankas sufiĉe da lernejoj kaj instruistoj. Granda kvanto el tiuj infanoj do kreskas de malgrandaj al plenaĝaj analfabetoj. Ne malpli granda estas la bezono pri sociaj helpistoj, kiuj povas instrui al la sahara ido kiel ĝi povas fari la unuajn, hezitajn paŝojn sur la longa vojo al socia leviĝo. On i devas ankoraŭ forigi nemezureblan malantaŭecon, antaŭ oni povas atendi, ke la infanoj de morgaŭ — el si mem — venkos la „mektub”, kiu ankoraŭ ĉiam estas transplantata en la korojn de la hodiaŭaj ĵusnaskitoj. Kaj nur post tio oni povas havi sukceson en la klopodoj liberigi la vilaĝojn kaj la homojn de la Saharo el tiu morta izoleco. Tiam oni ankaŭ povos konstrui la unuajn fundamentojn de la ponto inter tiu absoluta feŭda mondo kaj la dudeka jarcento de progreso.



Intertempe la infano laboras flanke de sia patro sur la kulturejoj de *Taghit*, *Béni-Abbès*, *Adrar*, *Aoulef*, en *Salah* aŭ *El Golea*. Ĉie la ĉielo estas blua kaj la palmoj grize-verdaj. Ĉie mordas la sablo kaj la skorpioj kaj pikas la radioj de la suno.

La knabeto *Omas* aŭ *Ali Jebli* aŭ *Mohamed* aŭ *Hamou*, aŭ kiun ajn nomon li portas, paŝtas la ŝafaron ek de la momento kiam la suno ekradias ĝis kiam ĝi sangeruĝe mortas. Tiam la knabo, pelas la ŝafojn hejmen laŭlonge de la senkreskaj flankoj de la sablaj dunoj, laŭlonge de la tombo de iu sankta marabuto kaj laŭlonge de la verda zono, kiu havas longecon de tridek kilometroj. Reve li rigardas antaŭ si, malproksimen preter la ŝafoj, al miriga sceno en siaj pensoj. Kaj li estas pli silentema ol la granda silento, kiu ĉirkaŭas lin. Li kuntiras la ĉifonan „djellabah” por protekti sian malgrasan korpon kontraŭ la unua malvarmo de la vespero. Post la vesperpreĝo (*lâ llâha illah 'llâh* — ne ekzistas pli granda Dio ol Alaho. Kaj: *Allâh akbar* — Alaho estas granda), li elfosas iom da sablo kaj kuŝiĝas. Neniaj zorgoj lin turmentas, ankaŭ ne la inflamo en la kruro, kiu ne volas resaniĝi. Li vivas ĉi tiun tagon, ĉi tiun minuton, ĉi tiun sekundon, kiu estas skribita „*mektub*”. Kaj tio, kio venos, estas ankaŭ skribita. Do dormu kaj ne antaŭpensu!


Aliaj infanoj — knaboj — rajdas tagon post tago sur azenoj tien kaj reen. Sed neniam mi sukcesis eltrovi, kien la nerve trotetantaj muloj portis siajn junajn rajdantojn. Kiam tiuj knaboj vidas ion, kio vekas ilian interesiĝon, ili haltas, kaj rigardas, rigardadas, kaj staras senmovaj, kvazaŭ dormantaj, kvazaŭ hipnotigitaj. Ĉu ili ankoraŭ estas vivaj?...

Subite ili piedpuŝas la ventron de la besto per la kalhavaj kalkanoj. La nerva trotetado rekomenciĝas. Ili malaperas en la kurtenon de la verdaĵo. Kien ili iras? vi demandas. Kiu scias! Kiu diros! Eble ili faras rondiron por forpeli la tempon kaj atendi la sekvantan minuton....kiu ja estas skribita „*mektub*”!

La knabinoj portas surkape pezajn kruĉojn kaj sitelojn penajn de akvo, de la fonto al la kvieta loko tuj kontraŭ la argila moskeo, kie oni nun konstruas muron el argilo kaj akvo. Ili ne portas vualojn, tiuj infanoj, kiuj jam preskaŭ estas junaj virinoj. Kaj kiel junaj virinoj ili trilridas kaj babilas senĉese kaj abunde. Seninterrompe ili treniras tien kaj reen en longa ĉeno en kiu ĉiu infano, ĉiu kruĉo kaj ĉiu sitelo estas ĉenero. Kiam ili ne bezonas porti akvon ili perkante endormigas etulojn aŭ ili knedas paston, el kiu oni bakos super fajro en la vespero rondan dikan pankukon, de kiu la tuta familio manĝos. Aŭ ili preparas la „*kurkus*”, farunaĵon, kiu estas la popola nutraĵo de la plej suda oazo ĝis Oran kaj Alĝero ĉe la marbordo.

La plej multaj infanoj de la oazoj forigas la tagon per nenionfarado. Ili maluzas la tempon laŭplaĉe; ili dormas en la polvo de la stratoj, en kreskajo kaj sub palmoj. Ili banas en la suno kaj faras fajrojn per seka ligno; ili vagas ĉirkaŭ la „*bordj*” insiste petantaj cigardojn kaj kompreneble... moneron de la malmultaj Eŭropanoj.

Dum horoj ili cerbumas sur la pinto de malproksima duno el helflava sablo, aŭ ili kaŭras en la aperturo de la dompordoj, suspekte fiksrigardantaj ĉiun preterpasantan fremdulon; ili ludas kune aŭ solaj en la sablo, aŭ aŭskultas la maljunan Hasan, kiu estas de ĉiu konata kiel granda babilemulo. Ili kaptas la riĉkolorajn birdetojn de la palmoj kaj klopodas vendi ilin al la turisto, kiu okaze preterpasas kaj rapide fuĝas, ĉar la romantika oazo de la vojaĝoficejoj montriĝas seniluziigo. Kelkfoje ili sin lavas, sed plej ofte ili estas ĝishaŭte malpuraj, kovritaj de tavolo da glueca polvo, ĉar ili neniam senvestigas sin. Kiam ili havas



ŝancon (prefere dudek ol dek fojojn ĉiu tage) ili trinkas la dolĉegan, mielflavan fortan mentoteon el delikate pentritaj glasoj. Sed nur malregule kaj tre malofte ili ĝuas sufiĉan manĝon. Mi memoras knabon el la oazo Taghit, havantan proksimume ok jarojn, kiu rakontis al mi: „Dum la tuta semajno mi ankoraŭ nenion manĝis. Sed hodiaŭvesperon ni buĉos ŝafon. Kaj ni tute formanĝos ĝin de kapo ĝis vosto. Kaj la okulojn kaj intestojn ni konservos por la „kuskus”. Mi ne povis kredi tion, kvankam mi sciis tion vera.

Pli poste en tiu tago mi revidis la infanon, kiu estis desegnanta en la sablo. Okulferminte li nun fumas cigaredon. Tiel — kaj kun ĉifonoj pendantaj sur lia korpo — li faris tre tragikan impreson: la impreson de malgranda, soleca kaj perdita homo, kiu apatie lasas iri trans sin la torentojn de sablo kaj de vivo, kaj kiu nek konas esperon, nek malesperon, kaj vivas plu de sekundo al sekundo sen ia ajn aspiro, tormentita de „mektub”.

Eble, eble iam lia mortiga izoleco estos rompata. Kiam la oleo fluos.....

*Harry Q. Peet, tradukis: Amsterdamanoj
el „Oost en West”, kiu aĝable pruntis la kliŝojn.*

FILATELIO

NOVAĴOJ POR NIA KOLEKTO „RELIGIO“

VATIKANO. *10 aermarkoj kun obeliskoj sur la plej gravaj placoj en Romo:

5 L, violkolora kaj 50 L, verda: obelisko ĉe *Sta. Johano de Laterano*; gravuraĵo de *R. D. Giuseppe*.

Sur la *Piazza di S. Giovanni* staras egipta obelisko, kiu kun la kruco estas 47 metrojn alta. En 1400 antaŭ Kristo ĉi tiu kolono staris en *Heliopolis* antaŭ la templo de la sundio. En 357 imperiestro Konstanteno starigis ĝin en la cirko *Maximus* en Romo kaj en 1588 ĝi estis transportata al la *Piazza di S. Giovanni*.

10 L, smeraldoverda kaj 60 L, karmina: obelisko kaj baziliko *Maria Maggiore*. Gravuraĵo de *S. Mattei*.

La obelisko staras sur la granda *Piazza dell'Esquilino*; ĝi venas de la maŭzoleo de imperiestro Aŭgusto.

15 L, sepikolora kaj 100 L, blua: obelisko sur la placo de la *Sta. Petro*. Gravuraĵo de *A. Quieti*. La obelisko sur la mezo de la placo estas farita el ruĝa granito kaj staris en la cirko de *Nero*. Ĝi estas 41 metrojn alta.

25 L, olivkolora kaj 200 L, bruna: obelisko sur la *Piazza del Popolo*. Gravuraĵo de *O. Torcoline*. Ĝi estas la plej malnova egipta obelisko en Romo. La placo estas ovala; ĉe la flanko, kie komencas la *Via del Corso* estas du preĝejoj; maldekstre la *Sta. Maria en Monte Santo* kaj dekstre la *Sta. Maria dei Miracoli*, ambaŭ barokstilaj. La obelisko estas alta 24 metrojn (kun la kruco 36.5 metrojn.)

35 L., blua kaj 300 L, okra: obelisko kaj preĝejo *Trinita di Monti*. Gravuraĵo de *F. Pacani*. Sur altaĵo, atingebla per la t.n. *Scala di Spagna* (la hispana ŝtuparo), kiu estis konstruata en 1725, staras la preĝejo *Santa Trinita di Monti*, konstruita en 1495-1590; ĝi estas uzata de la Fratinoj de „*Sacré Coeur*“, kiuj havas sian monaĥinejon en la apuda internejo. Sur la preĝeja placo, super la ŝtuparo, staras la obelisko.

* La Kristnaskoserio konsistas el 3 valoroj:

15 L, nigra; 25 L, helkarmina; 60 L, blua.

Bildo: la stalo de Bethlehemo, la *Sta. Familio*, la paŝtistoj kaj la 3 Saĝuloj el la Oriento, laŭ pentraĵo de *Raffaello*, skizita de *Ca. Dabrowska*. Gravuraĵo de *Colombati*. La pentraĵo sin trovas en la *Vatikana Muzeo*, Teksto: „*Nativitas D.N.I. Christi*“.

* 1-a centjarfesto de la patroneco de *Sta. Kasimiro*, reĝo de Grand-Polujo, en *Litovujo*:

50 L, bruna kaj 100 L, bluverda.

Bildo: dekstre en medaliono busto de *Sta. Kasimiro*; teksto „*Patronus S. Casimirus, Primaverus Lithauniae*“. Maldekstre sur altaĵo la reĝa kastelo; fronte la katedralo de *Wilna*. Gravuraĵo de *A. Quieti* laŭ skizo de *V. K. Jonyas*. *Sta. Kasimiro* naskiĝis kiel princo de Polujo (1458). Li mortis la 4-an de marto 1484. Lia tombo estas en *Wilna*. La vivo de *Kasimiro* estis karakteriza pro virga ĉasteco kaj granda amo por la senhavuloj. Por honorigi la Dipatrinon li verkis la belan himnon „*Omnia Dei*“. Kopio de ĝi estis trovata apud lia sendifekta korpo, kiam oni malfermis lian tombon en 1604.



NI GRATULAS

Patro Komandoro Georgo Plank O.Cr. St Karl, Kreuzherrengasse 1, WIEN-IV-50, Aŭstrujo, festos 17.7.60 sian oran sacerdotan jubileon. Li fariĝis esperantisto jam antaŭ la unua mondmilito kaj i.a. predikis en Esperanto en la Diservo dum la Malnovaŭstria Esp. Kongreso en *Franzensbad* 1913. Aktive li kunlaboris ĉe la IKUE-kongresoj en Vieno 1924 kaj 1958, kaj ĉiam estas preta, afable servi al nia afero. Patro Plank estas ankaŭ religia konsilanto de nia aŭstria IKUE-sekcio AKLE.

Dio donu al li benon, gracon kaj sanon dum ankoraŭ multaj jaroj! *

Prelata Moŝto D-ro Hermann Peichl O.S.B., abato de la benediktana monaĥejo „Schottenstift“, Vieno estis konsekrate abato antaŭ 30 jaroj. La alta jubileanto restas en nia dankema memoro kiel domestro de la kunvenejo de „Nia XXVIIa“ en 1958 pro lia signifplena salutparolado dum la inaŭgura kunveno. — Dio akceptu niajn preĝojn por li! *

Prof. Rudolf Kaftan, la ankoraŭ aktiva direktoro de la Viena Horloĝ-Muzeo, esperantisto de 1911, festis sian 90-an naskiĝtagon. Dio benu nian samkredanon samideanon per daŭre bona sano! *

Monsinjoro D-ro Antonio Eltschkner, titola episkopo de *Zefirio* kaj help-episkopo de *Praha*, eksprezidanto de la Ligo de Katolikaj Esperantistoj en Ĉeĥoslovakujo, festis la 80-an datrevenon de sia naskiĝtago 4.6.60. Laŭ nia scio Msro. Eltschkner estas la ununura episkopo, kiu portas la Esperanto-stelon en sia emblemo. Dio donu al li saĝecon, prudenton kaj sanon dum ankoraŭ multaj jaroj! *

Nia multjara fidela membro *Patro D-ro Anselm Schwab O.S.B.*, paroĥestro de la famkonata pilgrimejo „Maria Plain“ en *Salzburg*, Aŭstrujo, (vidu E.K. 1960, 109) fariĝis 50-jara. Ni deziras al li longan vicon de bonegaj jaroj kaj instigas niajn legantojn, nepre persone saluti nian fervoran samideanon, kiam ili vizitos la nomitan pilgrimlokon. *

Ankaŭ korajn gratulojn al nia juna, fervora samideano *Klaus Perko* en *Graz*, Aŭstrujo, kiu faris la ŝtatan ekzamenon pri Esperanto-instrukapableco ne nur kun sukceso, sed eĉ kun distingo! *

La 4-an de junio 1960 Msro *A. Baraniak*, ĉefepiskopo de *Poznán*, sacerdotigis pastron *Stefanon Kucharski*, kies fervoro por nia movado estas bone konata al la verdstelanoj de la fama Foira Urbo de Pollando. Jam kiel diakono li ricevis de siaj superuloj permeson, prediki esperantlingve. Kunfratoj kaj amikoj, membroj de PKUE, pola sekcio de IKUE, bondeziras kaj gratulas al la respektinda Primicianto pere de nia IKUE-revuo. Kompreneble ties redaktorino kaj la estraro de IKUE volonte envicigas sin! *

Omnia Dei	—	ĉiujn tagojn
Die Mariae	—	laŭdu Marian
Mea Laudes Anima	—	gloro mia animo
Eius festa	—	solenu ŝiajn festojn
Eius gesta	—	solenu ŝiajn agojn
Cole devotissima	—	kun devoceco

J. S. Jansen.



NI RECENZAS *Leander Tell: LA BELA SUBTERA MONDO.* 23,5 × 15 cm. 96 paĝoj. Kun multaj esprimriĉaj ilustraĵoj. *STAFETO*, Popularscienca Eldonserio. Eld. J. Régulo Pérez, La Laguno. Prezo: 8,— guld. + afranko. — La ĉiam fekunda eldonejo denove aperigis tre imponan verkon, kiu pliriĉigas la Esperantoliteraturon. Certe ekzistas personoj, kiuj ankoraŭ nenion scias pri la *speleologio*, la scienco de la grotesplorado, aŭ opinias ke tio estas sporto de duonfrenezuloj, kiuj frivole riskadas sian vivon. La famkonata, sperta sveda speleologo *Leander Tell* en klara maniero eksplikas

la grandan utilon de la grotesplorado por diversaj sciencaj fakoj, kaj por la bono de la homaro. Li kondukas la leganton en mallarĝajn, malhelajn tubojn, je kies fino ofte troviĝas mirakloj de la naturo, grandegaj salonoj kun stalaktitoj kaj stalagmitoj formitaj dum jarmiloj, subteraj lagoj kaj eĉ prismo de koloroj. Ankaŭ por personoj, kiuj kiel la subskribantino, havis la avantaĝon ĉeesti multajn prelegojn de mondfamaj speologoj kun kolorfilmoj aŭ diapozitivoj, la verko estas tre interesa: ĝi refreŝigas la memoron, revokante tiujn prelegojn; ĝi rakontas novajn faktojn aŭ pli bone klarigas aferojn, kiujn oni dum iu prelego ne tute komprenis kaj vekas la deziron, ekscii pli multe pri tiu interesegega temo. En apartaj ĉapitroj la aŭtoro priskribas la plej gravajn grotojn — da kiuj troviĝas dekmiloj en la mondo — en ĉiu lando, aldonante la adreson de la koncerna speleologia klubo. Ni kore gratulas la faman speleologon, nian samideanon, kiu verkis la libron originale en Esperanto, en bela, klara, flua stilo, kaj esperas ke ĝi ne nur renkontos bonan akcepton inter la esperantistaro, sed ankaŭ estos tradukata el Esperanto en diversajn aliajn lingvojn. Al la eldonisto gratulon kaj dankon pro tiu grava eldono, kiu sendube pligrandigos la estimon por nia lingvo, uzata por tiaj gravaj sciencaj temoj.

EŬKARISTIA ROZARIO, 12 x 8 cm. 16 pĝ. + kovrilo. Prezo 1 resp. kup. Por Italujo 50 liroj. Eld. Patro Giacinto Jacobitti, O.P. Piazza M. Maggiore 8, ROMA. La plaĉa libreto, en simpla stilo kaj klara preso, estas jam vaste disvastigita en Italujo, kie ĝi unuafoje aperis en 1915 kaj jam transvivis la dekan eldonon. La Eŭkaristia Rozario fluis el la koro de *Matilde Jacobitti Langmann*, pie mortinta 10.7.1958, kaj havas antaŭparolon de kardinalo *Maffi*, ĉefepiskopo de Pisa. Ni esperas, ke la eldono en Esperanto havos tra la mondo same grandan sukceson kiel ĝis nun la itala.

Truus Durenkamp.

NOVA REPRESENTANTO POR HISPANUJO

Jam en la pasinta jaro nia fervora estrarano, s-ro *A. Pedro Marqueta en Zaragoza* sciigis nin, ke pro abundo de profesia laboro, pro siaj taskoj en la Hispana Esperanto-Movado kaj pro kelkaj aliaj okupoj, li ne plu trovas tempon por plenumi la taskon de landa reprezentanto de IKUE. Li tamen konsentis daŭrigi la laboron, ĝis alia persono, taŭga por tiu tasko, povos transpreni ĝin. Ni tre kore dankas s-ron Marqueta pro ĉio, kion li faris — kaj certe ankoraŭ faros — por nia IKUE kaj deziras al li bonan sukceson en liaj diversaj taskoj.

La nova reprezentanto estas s-ro Francisko Tur Riera, Calle S. Carlos 6, IBIZA. Beleaes, kiu baldaŭ esperas akiri poŝtkonton por plifaciligi la pagojn. Bonvenon kaj sukceson al la nova funkciulo!



Nova metodo por varbado! Novaj, nerefuteblaj argumentoj. La varbito poste neniam seniluziiĝos. Varbilo kun instrukcioj: 5 intern. respond-kuponoj. Adreso: *Esperanto-propagando*, Poŝtfako 212, Lund, Svedujo.

Mi deziras korespondi kun s-anoj el la tuta mondo, sed speciale el Polujo, Aŭstralio kaj Afriko. Mi estas 18-jara

studento kaj havas intereson por lingvoj, historio, nuntempaj aferoj, mallongonda radio kaj motorcikloj. S-ro *Robert Klapouchy*, 108 Thorne St., Jersey City, N.J., U.S.A. *

La esperantista grupo de *Pax Christi* de la *Pariza Regiono* intencas gemeliĝi kun tiu de *Bavarujo*. Tial s-ro *Jean Barrier*, 34 rue R. Salengro, *Drancy-Seine Francujo*, petas ke b.v. skribi al li la membroj de *Pax Christi*, kiuj loĝas en ĉiu el la menciitaj provincoj (*Bavarujo* kaj *Pariza Regiono*) kaj kiuj korespondas kun membroj de la alia regiono. Ĉiu estas petata indiki sian nomon, sian adreson kaj tiujn de la korespondanto. *

Biblioteko cirkulanta S. Miguel, adreso: R. Cap. Francisco Isaias de Carvalho 6, *S. Miguel Paulista - S. Paulo, Brazilo*, malfermita por la publiko ĉiutage, deziras starigi *Esperanto-fakon*. Estas urĝe petata la kunlaborado de la tutmonda esperantistaro. Sendu almenaŭ unu libron; tiel vi kontribuos al la diskonigo de *Esperanto* kaj *nepre ricevos memoraĵon el Brazilo*. *

La Internacia Foiro de Poznań, ul. Glogowska 14, *Poznań, Pollando* decidis aranĝi *Esperanto-Infirmejon* kaj ekuzi *Esperanton* kie tio montriĝos necesa. Vizitantoj de la Foiro aŭ de la urbo *Poznań* estas petataj skribi siajn rimarkojn, impresojn kaj sugestojn en la *Memorlibro*, troviĝanta ĉe tiu *Infirmejo*. Eksterlandaj s-anoj b.v. sendi gratulon kaj instigu komercajn firmojn en sia urbo, turni sin en *Esperanto* al la nomita adreso por informoj kaj demandoj pri la Foiro. *

De 1—15 sept. 1960 okazos granda propaganda ekspozicio; ni afable petas alsendon de revuoj, gvidlibroj, fervojaj horaroj, komercaj broŝuroj ktp. en *Esperanto* aŭ kun parta *Esp. teksto*, kaj de ĉiuspecaj esperantaĵoj. Laŭdezire ni volote resendos la objektojn post la fino de la ekspozicio. Adreso: *Delegación del Frente de Juventudes*, Menéndez Pelayo 18, *Palencia, Hispanujo*.

Jarlibro 1960

Listo de la sacerdotoj:

Adressanĝo Aŭstrujo: D-ro P. Hohenwarter, Dekano; nova adreso: *Wolfrathplatz 2/28, Wien XIII*.

Aldonu Pollando: Stefano Kucharski, *Lubranskiego 1a, Poznań*.

Listo de la Konsuloj:

Francujo, Nantes, ŝanĝo de telefonnumeroj; novaj numeroj: S-ro Luc. Béliard 74.04.40; S-ro R. Olivaux 74.01.71.

Krucvorteniĝmo

	I	II	III	IV	V	VI	VII	VIII	IX	X	XI	XII	XIII
A													
B													
C													
D													
E													
F													
G													
H													
I													
J													
K													
L													
M													
N													
O													
P													

Horizontale :

- A. fluganta muso (r); substanco, el kiu oni faras ĉokoladon.
 B. respekto (r); anonco.
 C. loĝejo por ĉevaloj; birdo (r).
 D. fiŝo (r); parto de stacidomo.
 E. kadenco (r); pronomo, alia formo anstataŭ vi.
 F. legomo (r); plena indiferenteco (r).
 G. molusko kun malgranda konko (r); planteto
 H. plata, maldika briko por kovri la tegmentojn; konstruaĵo.
 I. deklari ion senvalora (r); ŝirmita kontraŭ infekta malsano (r).
 J. sufikso (r); kartludo (r); parto de la vizaĝo (r).
 K. partikulo.
 L. kies dimensioj superas la ordinarajn (r) ; arbofrukto.

- M. cedo de io por interkonsentita prezo; esti ies posedajo (r).
 N. esploro de problemo per ekspertoj, el kiuj ĉiu aparte esprimas sian opinion (r); fraŭlo (r).
 O. floro (r); precize.
 P. lirika versaĵo (r); senkolora (r); stangeto kun pinto, kiun oni jetas per la pafarko (r).

Vertikale :

- I parto de domo (r); birdo.
 II ekzisti; religia ceremoniaro (r); muzika verko (r).
 III metalo (r); inflorosko de saliko, alno kaj betulo (r), fera ilo, ĵetata en la akvon, por fiksi ŝipon (r).
 IV sfera objekto por ludi (r); faruno el la medolo de hinda palmo (r); digno.
 V inklino; detranĉi kaj kolekti grenon (r); doni monon al edziniĝanta filino.
 VI penetrigi korpon per pinta objekto (r); poseda pronomo.
 VII papero, per kiu oni kovras la murojn de ĉambro (r); infanmanĝulo (r); konjunkcio.
 VIII alta temperaturo; proksima.
 IX amesprimo; parazita insekto (r); ŝippasejo (r).
 X besto (r); bonodoro (r); granda birdo (r).
 XI korpa organo; malkuraĝa persono (r); kolekto de geografiaj kartoĵoj (r).
 XII birdo (r); partikulo, artikolo.
 XIII plenigi spacon aŭ tempon; granda ondo (r).

Li de Jong-Roobeek.



La pura salato.

Maljuna fraŭlo invitis amikon al vespermanĝo, kies menuo montriĝis esti terpomoj, salato kaj viando. La gasto diskrete demandas: — Ĉu vi bone lavis la salaton? Ĝi havas nekutiman guston!
— Jes, mi lavis ĝin bonege: ĉiun folion aparte, kaj mi eĉ uzis sapon!

Sukcesa fiŝkupto.

Urbano libertempas en vilaĝo kaj tie iras fiŝkapti en lageto. Subite ekrigardante, li rimarkas ke policisto staras apud li. Timigite li demandas: — S-ro policisto, ja ne estas krimo ke mi fiŝkaptas ĉi-tie? — Tio certe ne estus krimo — trankvile respondas la policisto — sed estus miraklo!

La statuoj.

Patro vizitas kun sia fileto ekspozicion de skulptaĵoj; por enkonduki la infanon en la skulptarton, li klarigas la signifon de la diversaj statuoj. Poste ili promenas ĉirkaŭ la konstruaĵo, kaj la fileto, montrante al grupo, demandas:

- Kion signifas tiuj statuoj?
- Silentu, stulta knabaĉo — duonflustras la patro — ili estas laboristoj!

Tomo Moore kaj aktoro.

Tomo Moore, la fama angla poeto, estis invitita al bankedo. Kiam ĉiuj estis jam ĉetable, unu el la tre junaj aktoroj, volante turni al si la atenton, laŭte diris trans la tablo al la poeto: — Bonvolu diri al mi, sro Moore, ĉu estas vere, ke via patro estis sukeraĵisto?

- Jes, estas la vero — rediris la poeto.
- Tiukaze, kial vi ne fariĝis tio? — demandis denove la aktoro.
- Mi pardonpetas — rebatis la poeto, sed antaŭ ol mi respondos vian duan demandon, mi volus ekscii ĉu via patro estis ĝentilhomo?
- Evidente — rediris fiere la junulo.
- En tiu kazo, kial vi ne estas tio?



S-ro Fr. W. en B. B. Pollando. — Dankon pro p.k. La antaŭ ensenditaj artikoloj tamen ne taŭgas por nia revuo. *

S-ro B. G. en N. M. Ĉeĥoslovakujo. — Dankon pro ensendoj: ni publikigos laŭ povo kaj volonte akceptos anekdotojn kaj mallongajn, ankaŭ spritajn, rakontojn. Enpreso de libro-listo estas finita post kiam ĝi

aperas en la jarlibreto. Cetere la kovrilo havas spacon por nur parto de la titoloj.*
S-ino Julieta, Parizo. Koran dankon pro la artikolo pri la Ekumena Koncilo. Ĉar en *Vojo, Vero, Vivo*, kiun abonas multaj el niaj legantoj, ĵus aperis ampleksa artikolo pri tiu temo, ni almenaŭ provizore ne povos lokigi ĝin. Eble poste. *

Al diversaj ensendintoj de artikoloj. Pro spacomanko ni ne ĉiam tuj povas lokigi ĉion en la sekvonta kajero. Kio estas tre aktuala, aperas laŭeble tuj, sed ĉio taŭga estas konservata kaj aperos siatempe. *



RADIO VARSOVIO elsendas ĉiutage de 16.30 - 17.00 M.E.T. duonhoran programon en Esperanto sur mallongaj ondoj: 25,09 - 25,16 - 25,42 - 31,01 - 31,45 - 31,50 - 42,11 m. kaj sur meza ondo 249 m. (resp. 11955 - 11925 - 11800 - 9675 - 9540 - 9525 - 1205 kc/s).

RADIO ROMA Esperanto-Fako, Casella postale 320, Roma (Italujo).

La dissendoj okazas de h. 18.55 ĝis h. 19.10 (M.E.T.).

Ondlongoj: metroj 30.90 = Mc/s. 9.71; 41.24 = Mc/s 7.27; 50.34 = Mc/s 5.96.

Prelegantoj: marde: alterne S-ro L. MINNAJA kaj Prof. D-ro V. MUSELLA; merkrede: S-ro Luigi MINNAJA; vendrede: Prof. D-ro Vincenzo MUSELLA.

JULIO 1960

1: Unua jarmilo de la itala lingvo; 5: Tra la literaturo; 6: Kuriero de Esperanto; 8: Leterkesto kaj bibliografio; 12: Novaĵoj el Italujo; 13: Kuriero de Esperanto; 15: Italaj belartaj urboj: Lecco; 19: Italaj kanzonoj en Esperanto; 20: Kuriero de Esperanto; 22: Mortintaj urboj: Sibari; 26: Akvofalo de Marmore; 27: Kuriero de Esperanto; 29: Nobel-premio Luigi Pirandello.

AŬGUSTO 1960

2: Tra la literaturo; 3: Kuriero de Esperanto; 5: Vizito al Romo de la Olimpikoj; 9: Italaj provincoj: Belluno; 10: Kuriero de Esperanto; 12: Grandaj Sanktuloj: Sankta Roza el Lima; 16: Italaj kanzonoj en Esperanto; 17: Kuriero de Esperanto; 19: Leterkesto kaj bibliografio; 23: Novaĵoj el Italujo; 24: Kuriero de Esperanto; 26: Malfermiĝas la Olimpikoj en Romo; 30: Italaj kanzonoj en Esperanto; 31: Kuriero de Esperanto;

PROGRAMO DE LA 21a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO EN PONTEVEDRA — 21 - 24 JULIO 1960.

Ĵaŭdo 21/7: Solena Meso. — Oficiala malfermo. — Lunĉo. — Kolektiva fotografado. — Prepara kunsido. — Porinfana kunsido. — Folkloro festo (muziko, dancoj).

Vendredo 22/7: Unua laborkunsido. — Vizito al Muzeo kaj lokaj vidindaĵoj. — Prezento al la Aŭtoritatoj de la rezultoj atingitaj dum sesmonata kurso (duonhoron ĉiutage) kompare al similaj kursoj por franca kaj angla lingvoj. — Ekzamenoj de Esperanto. — Regionaj distroj.

Sabato 23/7: Sienca aŭ kultura prelego en Esperanto. — Dua laborkunsido. — Solena fermo de la Kongreso. — Adiaŭa vespermanĝo.

Dimanĉo 24/7: Postkongresa ekskurso al la mondfama turisma restadejo *La Toja* kaj al la tipa marista vilaĝo *Combarro*, k.t.p.

Aliĝo por eksterlandanoj senpaga.

Pontevedra situas je la *galiga* regiono en la nordokcidenta parto de Hispanujo, proksime al Portugalujo.

Hispanujo estas taŭga lando por la eksterlandaj turistoj, kaj pro tio eble la fremdaj gesamideanoj amase partoprenos la Kongreson.

PONTEVEDRA VOKAS VIN!